## ĈAPITRO IX

### La Viv-historio de la Falsa Kelonio[1]

"Vi ne povas imagi" diris la Dukino "kiel ĝojige estas por mi revidi *vin*, mia kara." Dirante tion, ŝi ligis sin al Alicio per la brako en tre bonkamarada maniero, kaj ili ekmarŝis kune.

Tre plaĉis al Alicio trovi, ke la Dukino estas nun bonhumora, kaj ŝi interne pensis ke antaŭe, kiam ili renkontiĝis en la kuirejo, eble igis ŝin malagrabla nur la pipro.

"Kiam *mi* estos Dukino" pensis ŝi "da pipro mi havos en mia kuirejo ĝuste neniom. Supo povas esti tre bona sen pipro. Eble pipro estas ĉiam la kaŭzo kiu igas la homojn koleraj." Kaj ŝi daŭrigis tre fiere, kvazaŭ konsciante ke nun ŝi eldonas novan principon, tre gravan por

[1] Krom multaj aliaj supoj, la anglaj havas du, kiujn oni nomas "kelonia" kaj "falskelonia." La unua, kompreneble, estas farata el kelonia viando. La alia estas je gusto tre simila; kaj oni konkludas ke se kelonia supo estas farata el la vera kelonio, la falskelonia nur povas esti farata el la Falsa Kelonio.





la homoj:—"Nur vinagro ac
kamomilo maldolĉigas, kaj—
grava principo) — nur sukera
infanojn. Se nur la plenaĝul
estus ja malpli ŝparemaj——"
Ŝi jam tute forgesis la Duki
surprize, aŭdante ŝian voĉon di
"Vi ion pripensas, mia ka
forgesas paroli. Mi ne po
momento citi la moralon de
mi rememoros ĝin poste."
"Eble ĝi ne havas moralon
diri.
"*Tut! Tut!* Vi bubino"
"ĉio ja havas moralon, se nur
ĝin." Dum ŝi parolis, la Duki
forte kontraŭ Alicio.
Alicio ne tre ŝatis tiun ĉi
unue, ĉar la Dukino estas (d
malbela; kaj due, ĉar ŝi havas
altecon por apogi sian akran
ŝultro de Alicio. Tamen, ĉar
malagrabla, ŝi laŭeble toleris ĉ
"La kroketludo ŝajnas nun p
diris ŝi.
"Mi konsentas" diris la Du
la moralo estas: 'Ho, nur la
igas la mondon rondiri.'"

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURST